

Program-ŝanĝoj

Post apero de la septembra-oktobra Bulteno, LEK-oficuloj eksciis, ke la kutima kluba kunveno ne estos je nia dispono la 26an de oktobro kaj 2an de novembro. Tial necesis fari ŝanĝojn, pri kiuj informas ĉi tiu frue-aperanta Bulteno.

Kluba Programo:**oktobro:**

- 26 (Jubilee Room, Hinda YMCA, 41 Fitzroy Square W1T 6AQ)
Sally Phillips: *Esperanto-veturoj en Afriko*

novembro:

- 2 Amika rondo (ĉe Irish Centre, sed en nekutima ĉambro)
9 David Thornell: *La Freud-revolucio* (1800h: konsilantaro)
16 Paul Gubbins: "Star in a night sky" – lanĉo de libro
23 Kvin-minutaj prelegetoj
30 Lingva studrondo

decembro:

- 7 Ludvespero: (gvidata de Mikaelo Sims)
14 Zamenhofa Vespero (gvidata de John Wells) (1800h: konsilantaro)
21 dec, 28 dec, 4 jan 2013
Neniu kunveno

Esperanta Kalendaro:

27 oktobro: Kunveno de la Orienta Federacio ĉe Layer Marney Tower. Informas: Roy Threadgold, roy@boydells dairy.co.uk
17 - 18 novembro: 24a Eŭropa Rendevuo, Stella Plage, Francio. Informiĝu ĉe <http://www.esperanto-nord.org>
23 - 25 novembro: 10a DRONDO. Hotel Adelphi, Liverpool. Informo EAB 0845 230 1887
27 decembro - 3 januaro 2013: novjaraj renkontiĝoj en Germanio.: 29a Internacia Festivalo, Dortmund www.internacia-festivalo.de; 11a Novjara Renkontiĝo, www.esperantoland.org/nr; 4a Novjara Internacia Seminario, www.esperantoland.org/nis (du lastaj ambaŭ en Xanten).


Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 9a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



Paul Gubbins

**Ekbrilos ĉe LEK stelo nova**

La 16an de novembro okazos en nia klubejo historie signifa evento: la lanĉo de libro kiu pruvos, al eĉ plej skeptikaj anglalingvanoj, ke Esperanto estas ja "vera" lingvo kun sia propra ampleksa literaturo, kaj do neniel (kvankam iuj ankoraŭ tion misasertas) nura projekto.

Temas pri *Star in a Night Sky*, impona volumo 520-paĝa, enhavanta paralelajn diverstemajn tekstojn, tradukitajn el Esperanto en la anglan lingvon. Jes - legu tion denove - ja *el Esperanto en la anglan*. Ĝin kompilis, redaktis kaj parte verkis d-ro Paul Gubbins, kies teatraĵojn, rakontojn kaj filmbendojn juĝistoj ofte premiis okaze de la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj kiu aktuale redaktas kaj *La Brita Esperantisto* kaj la prestiĝan novaĝ-magazinon *Monato*. Paul vizitos la klubon tiun vesperon por lanĉi sian novan verkon kaj informi klubanojn kaj gastojn pri ĝia enhavo.

Nu, kiujn "gastojn"? Por tion respondi endas unue menciigi ke *Star in a Night Sky* estas eldonita de Francis Boutle Publishers, neesperantisma eldonejo, kiu deziris inkludi Esperantan literaturon en pluropo da tradukitaĵoj el minoritataj lingvoj: ĝis nun el la bretona, manksa, galicia kaj normanda, al kiuj oni esperas baldaŭ aldoni la okcitanan, eŭskan, katalunan, skot-gaelan, kornvalan kaj ladinan. La eldonisto kunlaboras kun LEK pri organizado de la lanĉ-ceremonio. Clive Boutle mem partoprenos, kaj li sendis invitojn al ĵurnalistoj kaj al redaktintoj de antologioj alilingvaj. LEK invitos membrojn de najbaraj Esperanto-grupoj kaj aliajn esperantistojn proksime loĝantajn.

Kaj, kompreneble, vin mem. Nepre venu!

Pliaj informoj troveblas ĉe www.starinthenightsky.eu kaj ĉe www.francisboutle.co.uk

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 *beginners' class*

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons rokeby@globalnet.co.uk;

Sudlondono: Gregory Porilo esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre, 50-52 Camden Square, NW1 9XB lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ arturo@signalprent.demon.co.uk, Terry kaj Anica Page:

7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP; terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson:
5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Ĉi-jare prezentiĝis ĉe LEK la fama kaj tut-Esperantlingva filmo, *Angoroj*. La sukceso de tiu prezento instigas pripensadon pri kompareblaj programeroj. Ekzistas multe pli famaj Holivud-filmoj,



kiuj havas en si iujn elementojn Esperantajn: *The Great Dictator*, *Gattaca*, kaj *Blade Trinity*, inter aliaj. Ankaŭ estas filmoj, kiuj havas Esperantajn subtitolojn. Tamen, kio pri filmoj tute dublitaj en Esperanton? Nu, famega germanlingva filmo de 1981, *Mephisto*, estis dublita en Esperanton, okaze de la Esperanto-Jubileo en 1987 – supozeble treege altkvalite. La originalo gajnis la Oskaron, por Plej Bona Fremd-Filmo, kaj restas tre ŝatata inter kaj recenzistoj kaj kinuloj. La rankonto estas modernigo de la bonkonata tragedio de *Mefisto*, adaptita al kariero de talentplena aktoro dum la naziigita periodo de Germanio. Se do iu el vi posedas la dublitajn version en DVD-formato, ĉu LEK prezentu ĝin? Kvankam ĝi estas iom longa (2 horojn kaj 24 minutojn), tamen ĝi ja estas klasikaĵo en Esperantujo. Se iu ajn havas kopion, bonvolu informu min (lek.sekretario@gmail.com) – kun multaj antaŭdankoj! Mi mem antaŭvidas ankoraŭ unu kin-sukceson je iom baldaŭa vendredo.

Parolante pri sukcesoj: La lastatempan viziton de LEKanoj al portugala restoracio ĝuis ĉiuj ĉeestantoj. Dankoj al **TERRY** kaj **ANICA PAGE**, pro tio. Tio signifas, ke nia klubo eliris la kutiman ejon dufoje en la daŭro de malpli ol unu monato - ĉar en aŭgusto, dek el ni promenis tra Parkon de la Regento. Du tiaj aventuroj pli-malpli sinsekvaj en si mem estas rimarkinda afero ĉe ni. Ni fieru, kiel ne?

Bonvintren!

David Thornell